



DI VASATEREM

HUNGARA VIVO

90/3-4. 40,-Ft

loros la filozofion de Ivo Lapenna kaj difinon lian rolon en la historio de Esperanto. Fine mi volas fari unu etan rimarkon. En la libro ofte renkontiĝas esprimoj, ekzemple, tiaspecaj: „politika puĉo en Hamburgo” (temas pri UK en Hamburgo), „gvidanto de la Esperantomovado”, „oni ankoraŭ-foje konstatas la distancon, kiu ekzistis inter tiu eksterordinare riĉa intelekto kaj la grandparto de la popolo, kiun li gvidis ĝis sia morto”. Tiuj frazoj konvenas al la priskribo de situacio en iu ŝtato, sed ĉu taŭgas apliki ilin por esperantistoj? Mi volas iom citi el L.L.Zamenhof, kiun oni certe ne povas konsideri kiel grandan pensulon, sed kiu fojfoje diris ankaŭ pravajn opiniojn: „Ĉiu komprenas ja tre bone, ke la Esperantistoj ne prezentas ian regnon kun ĝendarmoj, kaj neniu havas aŭ iam povos havi la forton devigi la Esperantistojn ion fari aŭ ion oferi”.

Aleksandr Zagvazdin
(Tjumenjo, Sovetio)

Doble cent donacetoj de Rikardo Ŝulco

Rikardo Ŝulco: La Mago. Agregajtoj kaj pantunetoj. Eldonis: Esperanto-Centro Paderborn, 1989. 213 p. 21 x 14 cm.

ISTB 3-922570-61-5

Estas malfacile preni enmanen ajnan libron de Rikardo Ŝulco sen antaŭjuĝo, ĉu pozitiva, ĉu negativa. Li tro elstaras kiel markanto de la Analiza Skolo, por ke oni povus preteratenti tiun ĉi fakton kaj la flagran batalon post ĝi. Mi konfesas, mi flankenĵetis „Katarino Blum” post plurfojaj legoprovaj pro ĝia nedigestebla stilo. „La Mago”, male, ĝojigis min per sia kristala klareco (kio post „Til’ Strigospegul” kaj „Vespero jam fariĝis” cetere ne tro surprizas) kaj iom malkaŝis la subjektivan, senarmajan, tial pli ameban flankon de ĉi tiu senkompromisa analizisto.

Antaŭ ĉio oni ŝuldas klarigon pri la subtolo. Pantuno estas malaja fiksforma poemo el kvarversaj strofoj kun alternaj rimoj. Du rimantaj versoj regule ripetigigas tiamaniere, ke la para-liniaj versoj de ĉiu strofo reaperas en la sekva strofo kiel nepara-liniaj, krome la unua linio fermas la poemon kiel lasta verso, kvazaŭ rondigante la pensociklon. La ripetoj donas impulsan ritmon kaj pensan emfazon al la poemo. Ŝulco uzas en ĉi tiu volumo la plej mallongan, ankoraŭ eblan strukturon de la t.n. moderna ĉena pantuno: la tristrofano, kiun li nomas pantuneto. Tia formo postulas plejan disciplinon (cetere ne mankas ĉe tia rigora logikisto), la devigaj ripetoj ja lasas ne multan spacon al distriĝoj kaj pensovakoj. Sed la rezulto kronas per sonete sonora, ferme kompleta, streĉe densa kaj tial frapa formo.

Ĉiun pantuneton akompanas tutpaĝa desegno ne rekte kaj nepre rilata la enhavon. Ili konsistas el kapoj, torsoj, arkitektaj detaloj kun- kaj elkreskantaj aŭ kompletigantaj sin groteske, do „agregitaj” ne per natura kialo, sed per la fantazio de la desegnisto — Rikar-

do Ŝulco. Ili estas aparte ĝueblaj, mi proponus, ĝuendaj, ili ja simbolas la kalejdoskopicon de la reala vivo kaj etose nuanca la ne tro optimisman atmosferon de la poemcento.

Pri tio lasta oni ne miru: Ŝulco verkas poemojn ne por nura estetiko, sed „elskribas” el si la pezajn sedimentojn de ondanta, lukta vivo — ekde puŝaj mondmilitaj spertoj tra doloro pro perdita vivkunulino kaj aĝigaj jaroj ĝis amaroj de la analizismaj batloj kaj ceteraj „civilaj” problemoj, kiel ekologia mizero, homaj kaj homara sortoj, politiko. Post liaj naturbildoj, ofte senpasiaj priskriboj supozigigas, aludiĝas pli profundaj enhavoj fantazie malkaŝindaj, konjekteblaj sub simbolismaj aŭ alegoriaj vestoj.

La stilo mirigas per fonta klareco (substrekata per samsugesta tipografio kaj puraj rimoj), evito de ĉiu superflua, trorafinita vorto, kio konsiderendas virto ĉe tiom discipliniga formo.

Ŝulco ankaŭ rimportretas, i.a. Helmar Frank, sian mentoron Luis Mimo Espinalt. Ĉi tiuj pecoj ŝajnas plej pali en la kolekto pro sia panegireco kaj simpla listigo de meritoj. Multe pli vivas la sincere intimaj konfesoj, korelverŝoj, kiel en „Kalumnio” ekz.:

„Nun mi, pacema homo, devas lukti.
Neniam kontraŭ vi mi mavon pensis.
Ĉu mi ne rajtas, kiel vi, indukti?”

Nur pensoj penon mian ja kompensis.”
Kelkloke li rompas la normon modifante, inversante aŭ demandigante la ripetendan version, kio frape turnas la atenton al profunde trovebla esenco.

„Rigardu! Kiom pompas/trompas tiu pomo!”
„Mordante ĝin, vi sentos vin feliĉa.”
„Mordante, ĉu vi sentos vin feliĉa?”

La samversoj ĝenerale konfirmas, foje estingas, foje kontraŭdiras iun alian. Oni vidas petolan ludon de formo kaj enhavo, kaprican alternadon de estetiko kaj etiko, vibrigan streĉon de komplementaj valoroj ene de firma kunteo de konserva strofa normo. La poemo ofte ekas per bildo prinatura, iom simile al hungaraj popolkantoj, kaj transturniĝas al konciza kadenco eksplika, resuma.

Richard Schulz estas ne nur Rikardo Ŝulco, sed ankaŭ delikatsenta, morale pretenda kaj verserĉema poeto. Jam temp’ estis rekonita en li la pli mildan Muzon, kaj apreci lin laŭ kompleta valorlisto, kiel Jesuo Kristo konsilis: „Redonu al Cezaro la propraĵon de Cezaro, kaj al Dio la propraĵon de Dio.” „La Mago” ofertas bonvenan okazon por tio, plus multon pli.

József Kiss Horváth
(Hungario)

Omaĝe anstataŭ jubileo

MIYAMOTO Masao: Japanaj vintraj fabeloj. Originaloj. Redaktis: Yosikawa syoiti. Eldonis: SAT, Parizo, 1989. 153 p. 17 cm.

En ĉi tiu libro „fabelas” Miyamoto masao en du senco: fabeloj ĉiam enhavas ion seriozan, profunde spertan kaj veran, aliflanke ion distre kaj morale instruan, orientantan. Jen tiuj prezentigas liaj dumvintraj „babiloj”, faritaj en la okdekaj jaroj en diversaj lokoj (Sennacieca Revuo, Sennaciulo, Hungara Vivo, La Revuo Orienta k.a.) kaj kolektitaj en ĉi tiu modesta, sed plaĉa volumeto fare de Yosikawa syoiti.

La titola vorto „vintra” alproprigis funeb-ran aktualecon, Miyamoto ja mortis la 12-an de julio de la eldona jaro, transforminte ĉi tiun verketon el resuma, jubilea (li estiĝis 76-jara en 1989) al rememora, omaĝa.

„Japanaj vintraj fabeloj” estas guto da maro reprezentanta la nekredible vastan gamon de lia aktivado.

Li „fabelas” i.a. pri sia junula amo: la laborista movado en la aŭtobiografia novelo „Kantoj”; pri la iamaj idealoj ligitaj al Moskvo, pri desappointoj politikaj, heroaj fortostreĉoj de esperantistoj-komunistoj kaj anarkiistoj, pri sia kaj aliulaj malliberejaj vivoj, bataloj por la ideoj de internaciismo kaj socialismo (cetere en malliberejo li komencis lerni Esperanton).

Miyamoto, partopreninto de la militfinaj operacoj en Okinawa, forlasis por ĉiam la aktualan politikon, dediĉis sin ekde 1950 nur al la Esperanto-movado. Li donas valorajn komentojn por movadologoj pri Hasegawa Teru (plumnomo Verda Majo), japanino edziniĝinta al ĉino kaj batalinta por Esperanto kaj per Esperanto en la ĉina kontraŭjapana rezisto, aŭ pri la eminenta korea esperantisto Pak Honyung, ĝenerala sekretario de Korea Komunista Partio, vic-ĉefministro de Norda Koreio, kiun oni ekzekutis pro falsa akuzo pri spionado. Kaj pri kontaktoj de R. Sorge kun ĉinaj esperantistoj, unuvorte temoj, kiuj kompletigas la azian historion de nia movado. Komentojn, opiniojn, impresojn li donas, malofte ion sistemitigita kaj didaktecan, tamen trafajn, ĝisfundajn ekvidojn. El okuloj de neeŭropano, internaciisto, sociale pensanta humanisto. (Konekse kun tio ne malutilus legi lian lastan recenzon en revuo Esperanto pri libro traktanta la hungaran proletan respublikon de 1919.)

Formale li finis nur elementan lernejon, sed Esperanto donis al li vastan supervidon kaj erudicion, kiel U. Lins nekrologas prie kaj kiel ĉi tiu libro mem ankaŭ atestas kun sia vasta gamo de temoj kaj malfacile difineblaj, tipe japanaj ĝenroj. Yosikawa kompilis apud delikataj hajkoj kaj liberaj versoj ankaŭ liajn rememorojn pri laboristmovadaj spertoj aŭ liajn pri-malsanajn babilojn (kvazaŭ antaŭsente, ke ĉi tiu libreto estos adiaŭa por la diabeta kaj korritmigata movada faktoto). Nenio homa estis fremda al Miyamoto: ĉio rilata la homon interesis ĉi tiun ĉiam ridetantan, malceremonie ĉarman doktulon, renesance multflankan japanon.

Li malŝatis la pitan kvieton. Jen kiel li vokas memkonfese pri tio en la poemo „Vojaĝo sur Oĥocka maro”:

„Kaj vi, Oĥocko, / muĝu, bleku, hurlu,
/ forioze voregu rifojn /sub griza
plumba ĉielo! / Nur tiam vi estus
Oĥocko, / mia sopirata Oĥocko.”

Tiu senkvieta serĉemo rezultigis pensinstigajn, konsiderindajn komentojn pri la rea „Esperanta Antologio” kaj „Ĉina Antologio 1919-1949” (ĉina kaj japana aliro al Esperanto), pri la „Esperanto-sindromo” (por multaj esperantistoj la lingvo estas objekto de amo anstataŭ rimedo) kaj pri kelkaj lingvaj problemoj aparte interesaj el neindeŭropa percepto.

Min ravis, kiel oni povas per plej simpla tiopografio kunmeti belan volumeton kun delikataj grafikaĵoj, priaŭtoraj fotoj kaj arta arango, kaj ĝuste pro tio mi ne komprenis, kial enresitis valorfuŝe tiaj ortografiaj pretervido, kiel „Thälman”, „Trocki”, „Welther” (Werther de Goethe) kaj „anarkisto”. La libron pliriĉigas piednotoj (ĝentilaĵo al neazianoj) kaj listo de la aperintaj verkoj de Miyamoto.

József Kiss Horváth
(Hungario)

Por ĝojo kaj utilo

Turista Kantaro 2 — Triopa Kantaro. Redaktis Tivadar Kereszthegyí, Magdolna Juhász kaj Jolána Zsidi. Budapest, 1989. 21 cm, 68 kaj 84 p.

La tutmonda kutimo de kunvenintaj konatuloj ekzistas feliĉe ankaŭ inter esperantistoj. De tre longaj tempoj dum niaj kunvenoj kaj ekskursoj, renkontiĝoj en kluboj aŭ en la naturo la ĉeestantoj volonte amuzas sin komune kantante. La spirito — kaj la harmonio — de nia tiom muzika lingvo kvazaŭ instigas ekkanti. Eĉ pli, se la kantoj estas konataj, ĉu laŭ la melodio, ĉu laŭ la teksto, kaj des pli, se ĉarme flugantaj vortoj Esperantaj sonas.

Jen la dua kaj la tria volumetoj de la sukcesa serio de Turista Kantaro, kiu eminente klare presite prezentas grandan kolekton de kantoj kun tekstoj Esperantlingvaj. La triopo de la redaktoroj, kiuj donis aŭ poluris, ofte tradukis la tekstojn, havis videble grandan atenton al la facila kantebleco. Kun konsidero al tio, ke estas kolektitaj kantoj de la plej diversaj popoloj, el preskaŭ ĉiuj kontinentoj, kaj laŭ tre diversaj muzikstiloj — ĝis la plej popularaj modernaj — tiu zorgado neniel estis senproblema. Tamen, post elprovo de nekonataj (de mi) kantoj, serbaj, japanaj, germanaj kaj aliaj, ŝajnas, ke la redaktado atingis sukceson. Nur por mencii: ne mankas eĉ gramatikcelaj kantetoj, same ne ŝerco ludigaj pecoj, por igi plene gaja la atmosferon de la malplori voia societo.

Prenu en la manon tiujn kantarajn, ĉu por disdoni ilin inter la ĉeestantoj, ĉu dediĉante kelkajn minutojn por instrui la tekston de iom konata melodio — kaj la potenca efiko de la komuna kantado influos ĉies animon, farti bone en NIA RONDO.

Ervin Fenyvesi

Persone efikas perverse

Ĉu vi pentas, ke vi aĉetis la plej maskitan Esprantan poemaron, kiu aperis de l' praa tempo ĝis la nun? Certe ne, ĝi estas tute sekura, eĉ knaboj verkis ĝin al paca cel' — longe for, en la Bonurbo. Kaj ne nur por la pano! Pri profito ne pensas portanto de la lum'! Ili ludas, per tuta amperforto, bluson en rubuj' por mia knabino, por mi kaj por vi.

Kiuj nun pensas pri la kasedo „62 minutoj” de Persone, tiuj eraras. Temas pri poemvolumento pluraŭtora, kiu haveblis aldone al ĝi. Unue mi fajfis pri tiu kajereto, ĉar mi preferis kunfajfi la muzikon — poste, nekomprenante ĝisfunde ĉiun silabon el la „rapado” de Per Ola, mi konsultis ĝin por detaloj. Kaj tiam mi ekkonsciis, ke temas ne pri muzikŝopiloj, sed pri tekstoj poemaj, eĉ se nepremiiguntaj en Belartaj Konkursoj. Aplikata poezio, se vi volas. (Se vi ne volas, tiam kreu rok-operon el „La Infana Raso”.) En teksto por rok-kanto, krom la neebleco de bildpoemo aŭ akrostiko, certe ne eblas trokompliki la intervortajn kaj interideajn fadenojn, ne estas tempo por disvolvi fajnfilozofion, ne indas strebi je perfektaj rimoj. Male, gravegas bona prozodio, facila memorebleco (ripetoj!), tema identiĝo kun la aŭskultantaro. Pri aliaj diferencoj demandu ne la recenzanton, sed Bertilon, Martinon, Per Ola kaj Börje, kunverkintojn de ĉi tiu Nigra Kajero.

La tekstoj, kiuj vere efikas persone (tekston fruktas, muzikon produktas kaj ĉefkantadon ruktas unusama persono por preskaŭ ĉiu kanto), tamen unuecas en etoso. Etoso Esperantuja laŭ la temoj: pigreco (Bluso en Rubuj'), sekteco (Portanto de la lum'), privomindeco de la ekster Esperantuja vivmedio (Nur por la pano), mirindeco de la ekster Esperantuja vivmedio (La Bonurbo), umado (Eĉ knaboj), fiatomaĵoj (Tute sekura), aĉarmado (Ĉu al paca cel'), kaj ĉefe inoj (kie ajn).

La unueco estas ankaŭ stila, ja la bandanoj konjekteble ne allasis senkomente unu la alies tekstojn. Krome, pri rok-kantoj oni neniam scias: kiom da Lennon-McCartney-tekstoj estis fakte kunverkitaj? Estus do riske taksii aparte la tekst-talenton de la sesdekdu-minutuloj.

La plejparto de la tekstoj trafas direkte kaj volas diri, kion ĝi diras. Jen kion mi kutime ne ŝatas en poezio. Sed tie vidiĝas la diferenco: aliaj tekstoj de Persone, kiujn mi nur legis, ne tiom bone impresis min — ĉe tiuj ĉi mi ne povas ne aŭdi mense la muzikon, kaj kion la poemoj perdas en la kompromiso por fariĝi rok-kanto, tion ili regajnas en la muzika dimensio. Kaj, eble strange, ĝuste tiuj du tekstoj, kies mesaĝo estas pli kaŝita (De l' praa tempo ĝis la nun'; Portanto de la lum'), ne tiom plaĉas al mi supozas la fonan muĝadon pri iu Osmo) por tiuj kelkdekoj, kiuj ne scias laŭlaĉe, pri kiu temas.

Do, kun la supraj rezervoj pri atingebla poezia nivelo ni aprezu la homeoteleŭtojn de „Nur por la pano” (tiun mi fakte emus

akcepti kiel memrajtan poemon, malgraŭ la fortomanka fino), la vortludojn en Amperforto (“Vi forpuŝas min — vi kortuŝas min”) — la kanto, kiun pro bonsoneco mi pleje aŭskultigas al neverdulo — en „Ĉu al paca cel'” („peg-ungeg”, „pig-timig”) kaj aliloke; la ide-ludojn („la sekvojn vi ankoraŭ ne spertis — la spertojn vi ankoraŭ ne sekvis”) en „Tute sekura”.

Por respekti la lingvuman ĉikanemon de Esperantiaj recenzoj, mi menciu, ke mi povus mortrecenzi la formojn „La unuan fojon ke mi vidis vin” kaj „min mankas vol!”. Sed okazas, ke mi ŝatas ilin. Ni do atendu kompetendan decidon de la Akademio.

Mi eble devintus tajpi ne recenzon pri ili, sed poemon. Rok-kant-tekstan. Ĉar Persone efikas ankaŭ per-verse.

István Ertl





Centjarulo

— Altestimata oĉjo! Al kio eblas danki, ke nun ni festenas je via centa naskiĝtago?

— Al kio? Al la simpla fakto, ke mi naskiĝis en la jaro 1890!

Eble li diris

— Ĉu vin interesas miaj memuaroj? Jam delonge mi surpaperigis ilin, kaj mi rimarkis, ke ili tro kompromitus min. Pro tio mi presigis tiun verkon nur en unu ekzemplero.

Esti pli aĝa?

— Onklino kara, kvankam mi estas riĉa, kaj nur 60-jaraĝa, tiu aktorino ne volas iĝi mia edzino. Kion vi konsilas?

— Kion? Diru al ŝi, ke vi estas okdek jara!

Esti pli kur-aĝa?

— Neniam forgesu, sinjoro — emfazas kuracisto — ke via plej granda malamiko estas la alkoholo!

— Neniul timu, doktoro! Mi ne estas malkuraĝa...

Malkuraĝo helpas?

— Estimata tribunalo! Tiam mi estis tiom ebria — ekskuzis sin la aŭtoŝtelisto — ke mi ne riskis konduki mian *propran* aŭton.

Nescio helpas

— Kion vi pensas!!! Mi estas respektinda virino!!!

— Tutcerte, sinjorino, tion mi scias!

— Kaj mi volas resti tia!!!

— Tion mi ne sciis, sinjorino...

Similaj...

Direktoro al la sekretariino: — Kion diris mia edzino, kiam vi informis ŝin, ke mi hejmenvenos nur tre malf-rue?

— Ŝi demandis, ĉu tio estas tute certa...?

Eble ĉe ili...

La malfidela edzino post du monatoj revenas al la edzo. Li riproĉas:

— Ke vi forlasis min pro tiu aĉulo — nu, tion mi eble pardonos. Sed ke vi revenis — tion neniam!

GAJA
PAĈO

Ho, laboro?

La trejnisto diras al la klubteamo: — Ho, knaboj! Mi esperas, ke ĉiu komprenis la aferon. Aŭ ni gajnos la matĉon morgaŭ, aŭ ni eklaboros lunde...

Hunda afero

Danub-borde viro kartludas sur benko kun hundo. Iu promenantoj haltas tie, kaj post minutoj ekparolas:

— Estas grandioza tiu saĝa hundo!

— Ĉu saĝa? — diras la sidanto. — Male, tre stulta, ĉar se ĝi tiris bonan karton, tuj ĝi svingas la voston.

Eble ŝi...

— Diru kion ajn pri Elvira, sed restas fakto, ke ŝi estas fidela ino!

— Kiel do? Ŝi jam divorcis almenaŭ kvarfoje...

— Faras nenion! Sed ŝi daŭre havas la saman intiman amaton.

Krima hundo

— Mi redonas tiun hundon, hieraŭ aĉetitan — plendas virino en bestovendejo. — Tiu hundo ŝtelas! Tutan kolbason el la kuirejo!

— Tio ja ne estas tro danĝera, sinjorino! Mi garanti- as, ke monon ĝi neniam forprenos.

Obeema hundo

— Mia ĉashundo estas mirinde dresita besto — fanfaronas viro.

— Nu, la predon ĉiu ajn hundo alportos al vi — du- bas amikoj.

— Sed se mi alkrias ĝin: „Hektor! Ĉu vi venos al mi?!, aŭ ĉu ne venos!!?“, ĝi tuje tuj venas al mi, aŭ ne venas.

Mensoga hundo

— Mi aĉetis hundon — plendas Petro —, sed ĝi mensogas.

— Mi ne kredas vin — ridas Paŭlo.

— Sed ja! Rigardu! — asertas Petro kaj alkrias la hundon. — Hektor! Kiel faras la koko?

— Vaŭ-vaŭ — bojas Hektor.


— Do, ĉu vi kredas jam, ke ĝi mensogas?! — triumfas Petro.

„Saluto al Zamenhof”

El samtitola poemo de Edmond Privat ni citas la duan strofon: „Nun kreskas en mondo spirito homara, (Kaj iom el via noblega animo, „... — la daŭrigon ni kaŝis en la linioj H.1. kaj V.13.(ensendendaj linioj). Inter la solvintoj ni lotumos premiojn. Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Horizontale: 13. Interno, 14. Tre severa (ekz. leĝo), 15. Kare ŝati iun, 16. Loĝloko de birdoj, 18. Fari pakon, 20. Prepozicio, 21. Longa vira vestaĵo, 22. Konjunkcio, 23. Vira nom’, 25. Tio impresas flarsenton, 26. Prepozicio, 27. Part’ de mont’, 28. Duono de vestaĵo, 29. Malbona antaŭseno, 31. Malsano de orelo, 33. Hufulo, kun mallonga rostro, 34. Ovoforma (R), 35. Jarkomenco, 38. Epiteto de antikva ligna ĉevalo, 39. Nederlanda verkisto (Theun de ...), 40. Eĝon de geometria figuro, 43. Tranĉkapabla, 45. Ne duraj, 46. Natrio, 47. Reen: posedaĵo de iu, 48. ...edo: gaja programo, 50. Nia glob’, 51. Fino de V. 3., 52. Havena kondukisto de ŝipoj (R), 53. Gaja, hela, 55. Manĝeblan vegetaĵon, 57. Tabelvorto, 59. Persona pronomo, 61. Ludo de gajni dezirantoj, 63. Lasta ero de materio (R).

Vertikale: 2. Epopeo de Vergilio, 3. Ago por prepari viandaĵon, 4. Skulptita diaĵo, 5. Praa specio de bovoj, (R), 6. Ĉefo de katolika eklezio (R), 7. Scienca instanco (R), 8. Granda nemovebla ŝtono, 9. Pronomo, 10. Artikolo, 11. Prepozicio, 12. Pensiitaj, 17. Nia planedo, 19. Konsultantoj pri libroj, 23. Scienca pseŭdoprefikso, 24. Manĝeblan beron, 26. Dubranĉa anteno (R), 29. Pez’ de pakaj’, 30. Publika parolanto (R), 32. Paŝi internen, 33.



Trinkvazo (R), 36. Ŝipo de Noa, 37. Mallongigo, konata de ĉiu esperantisto, 38. Verkisto, vivinta en Meksikio, 41. Ne profesiulo de arto, 42. Prepozicio, 44. Voĉdoni, 46. Nulo, 48. Murdita Sovetia politikisto, 49. Bulgara poeto, nacia heroo, 50. Allogi, 52. ...Mall: Usona cigaredo, 54. Konforma al vero (R), 56. Urbo en Jugoslavio (sen supersigno), 58. Mezurunuo de elektra rezistanco, 60. Verba finaĵo, 62. Vokaloj de V.49.

Solvoj kaj premiitoj aperos en nia sekva numero.

I.Z.

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes

La granda aventuro de Ferenc Szilágyi

La dua eldono de tiu libro aperis kiel tria volumo de la Serio „Esperantaj Klasikaĵoj”.

1. Kiom da rakontoj el tiu ĉi libro aperis jam en „Trans la Fabeloceano”?

- 2. Kiun poemon de Szilágyi citas Vilmos Benczik en la postparolo?
- 3. Kiu estas protagonisto de la rakonto „Libera rabo”?

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj: en la sekva numero.

LETERKESTO

S-ro Ralph Dumain, Vaŝingtono, Usono: La ravitaj vortoj, kiujn vi surpaperigis post lego de la novelo-kolekto de *Sándor Szathmári*, estas tre pravaj, kaj ili koincidas jam delonge kun la entuziasmitaj pensoj de la legantaro. Tia granda pensulo kaj verkisto rajte akiris admirantojn tutmonde — kaj ne sole en Esperantujo — pro sia akra vida kaj humurplena, emfaze sendependa kaj profunde reala mondospektado. Liaj vidmanieroj tute kompreneble donas ankaŭ al vi, filozofo kaj ĵurnalisto, utilajn „rekomendojn” por via luktado kontraŭ la malhomeco, manipulanta trompado kaj ĉiutagaj stultaj-oj ene de la socio. Kaj Szathmári, kaj *Madách* („La tragedio de l' homo”) kapablis rimarki — sub kaj ekster ĉiaj imagoj kaj kredoj — la profundon de la homaj-homaraj antagonismoj, do la radikojn de la historiaj fenomenoj.

S-ro Peng Jianjun, Wuchang, Ĉinio: Alte rimarkinda ni trovis viajn informojn pri la dinamisma aktiveco de via *E-Societo Medicina*, kies vasta membraro firmigas ĝiajn diversflankajn agadojn. Ni nun mencias nur la akupunkturo-kurson por Esperantistoj, sed ankaŭ la „ĝemela” rilato inter ĉinaj kaj alilandaj medicinaj institucioj malfermos tre dezirindan vojon de E-kunlaboro internacia en scienca tereno. Por interesigantoj jen via adreso (por ĈMES): *Wuchang*, TJ-430.062, Chezhan Xincun 440-1, Xujiapeng.

S-ino Alma Z-e, Litovio, SU: Ion bizaran spegulis via korespondpeto: verdire, ĝi ŝajnis veni el longe forpasintaj tempoj. Tiam vere okazis fojfoje, eĉ inter esperantistoj de iuj kapturigoj, karakterizi sin mem „pura gentano”. Pardonon ni petas: neniel ni dubas, ke vi kutimas bone lavi vin, ne, tute ne! Sed kial tiun civilizecotrajton diskrii tra la „neprimitiva” Esperantujo?! Ni firme asertas al vi: tutcerte *puraj* angloj, francoj, germanoj, Meksikanoj aŭ eble Islandanoj ekkorespondos kun vi, eĉ se vi ne emfazus vian „purecon”. Aŭ ĉu temas *pri io alia??*

S-ro Francois O., Parizo, F: Povas esti, ke vi honoris per viaj tradukaĵoj ankaŭ aliajn redakciojn krom la nian. Ni alte respektas la verkojn de la franca poeto populara, *Jacques Prévert*, do vi certe komprenos, kial ni ne publikigas viajn Esperantigojn, kiuj faras malgraŭ la ambiciaj penoj impresojn ne kontentigajn. Anstataŭ detaligi ilin, ni atentigas vin pri la bone konata analogio inter *poemtradukoj kaj — virinoj* (vere trafa ankaŭ en via rilato): se ili estas belaj, tiam ne estas fidelaj; kaj se ili fidelas, tiam ne estas belaj — kompare al la originalaj de Prévert!

S-ro Germano Gimelli, Bologna, I: Pasiaj kolektantoj de *filatelaĵoj* — kia vi estas — povas vere ĝui la E-stampojn, specialajn kaj unuataĝajn, same la diverstemajn E-poŝtkartojn. Ties vastan gamon eldonis la *hungara poŝto*, se paroli nur pri la pasintaj du jaroj, kaj lasi nun senmencie ĝiajn E-eldonaĵojn filatelajn pli fruajn. Bedaŭrinde (aŭ feliĉige) ili rapide forvendiĝas en la poŝtoŝtatoj. Pere de helpemaj partneroj, tamen vi certe trovos eblon akiri plurajn por riĉigi vian jam abundan E-kolektaĵon.

Korespondi deziras

S-ro Orosz János, seruristo-veldisto, kun s-anoj tm. *Miskolc* Pozsonyi u. 84. H-3526. — Bibliotekistino Iwona *Broniewska* (29) kol. bk, pm. FDC, E-libroj; intereso pri literaturo, geografio, turismo. *Warszawa* ul. Stalingradzka 20 m 112, PL-03-468. — S-ro Seppo *Pietiläinen* konatiĝus kun pliaĝaj s-anoj el Hungario por leterŝanĝoj. *Porvoo* Joukahaisentie 3, F 34, SF-17150 Finnlando. — Instruistino, f-ino *Petrauskaitė* Regina (33) pri turismo, literaturo, kol. bk. pĉt. *Pasvalys*, Taikos gt. 33-11, Litovio SU-235.250. — S-ro Doru *Neagu* juna licea instruisto, pĉt kun s-anoj el Japanio, CS, H. Certe resp. *Braila*, Str. 30 Decembrie 1947, nr. 2. R-6100. — Lernantino Hele *Suurmets* (16) ktm, pri dancado, ŝako, turismo, interŝ. bk, kalendaretoj. *Polva*, str. Aasa 4 — 15, Estonio SU-202.600. — S-ro Evandro Jung *Barbosa* kun kolektantoj de pm — nur en blokoj. *Chapecó SC*, A/C Celesc, BR-89.900 Brazilo. —

S-ro Mello *Ermanno* (46) fraŭlo dez. trovi esp-istinon por kunvivado, ev. geedziĝo. Li ruĝhara, 170 cm, normalstatura, tre aktiva en socia agado, naturisto. *Milano* v-le Monte Nero 22, I-20.135 (tel. 02-597,386); poŝto ne fidinda ĉiam! — Kuracistino Alma *Slamaitė* (30) ktm amike *Panevezys*, Molainiu 20-62. Litovio SU-235. — Lernanto Eŭgeno *Nikolskij* (15) ktm, kol. pm. *Krasnojarsk*, Akademgorodok 7-78, Siberio. SU-660.036. — Lernantino Kataryna *Galazka* (17) gaja knabino en urba liceo, kun geknaboj en Eŭropo. *Belchatów* urbo, ul. Budryka 12/17. PL-97-400. — S-ro *Czerják* Lajos (34) pri lignoskulptado, familiaj rilatoj, vojaĝoj. *Cristuru-Seuiesc*, Zona Centr. BL.E3. ap.13. R-4180. — F-ino Hanna *Kulbacka* (19) por ekzercante ekkoni sincerulon kun humuro; int. modo, vojaĝoj. *Posnan* ul. Głogowska 146/8, PL-60-205. —



HUNGARA VIVO • Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik • Teknika redaktoro: Rózsa Vad • Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Stefan MacGill, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, d-ro György Nanovszky, Péter András Rados, Sándor Révész, Zsuzsa Varga-Haszonits. • Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponorithewrewk • H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 156-0244. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. • Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. • Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoŝtatoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (HELIR, Budapest XIII. Lehel u. 10/a. H-1900) senpere aŭ per poŝtmandato. • Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. Indexszám 25 377 0018-7704, ISSN 0018-7704. Készült a MESZ Nyomdában

AGORA ZÖLDÉRT SZEGED

PROVIZEJO DECSONGRÁD-DE- PARTEMENTO

Ĉiutage frumatene videblas granda aktivado en ĉiuj laborejoj, magazenoj, fridejoj de la ZÖLDÉRT de Csongrád-departemento, kaj samtempe en la legomvendejoj de la regiono, por ke post kelkaj horoj — kvazaŭ estus memkompreneble — meze de la vintro la aĉetantoj foriru kun freŝaj fruktoj kaj legomoj en siaj korboj.

Somere aŭ fruaŭtune estas ankaŭ simpla komercista agado distribui la freŝaĵojn, tamen la provizado dum vintro bezonas fortikan entreprenon, kiu disponas pri sufiĉe grandaj magazenoj, fridejoj kaj transport-sekcio.

Tia entreprenon estas la ZÖLDÉRT DE CSONGRÁD-DEPARTAMENTO — fondita antaŭ 37 jaroj — kies 1600 laboruloj okupiĝas pri varo-vendado de 80 mil tunoj ĉiujare — terpomo, karoto, cepo, pomo ktp. — en valoro de 2000 milionoj da forintoj. Tiu grandioza varoamaso, se transporti samtempe, bezonus ĉ. 120 km longan vagonaron!

EMINENTAJN VAROJN!

De la supre menciita varoamaso du trionoj estas liverataj eksterlanden, preskaŭ nur al okcidentaj merkatoj. La plenŝtopitaj fridejoj klarigas, kial oni nomas tiun ZÖLDÉRT la provizejo de la departemento. Krome ĝi liveras ankaŭ al komercejoj en aliaj departementoj, en Budapeŝto eĉ du grandkomercistaj bazoj staras je dispono al ĝi.

Por akiri la bezonatajn varojn, la entreprenon klopodas je bonaj kontaktoj kaj kun la grandaj, kaj kun la malgrandaj produktantoj, i.a. ĝi havigas al ili importitajn reproduktilojn. Interkonsento pri kunlaboro fiksas la rilatojn kun la *Frua Legomprodukta Sistemo de Szentes* ankaŭ

kun unu prilaboranto: Konservfabriko Szeged.

SEKIĜANTAJ SPICVEGETAĴOJ

Pasintjare en regiono de urbo Makó fondiĝis kompanio por vendi la produktaĵojn: partoprenas kvar



kooperativoj, krome ZÖLDÉRT kaj HUNGAROFRICT. Ilin interligas la fama cepo de Makó, depost cent jaroj tre bezonata varo multlande. *Makó Gold* estas jam registrita marko, kiu akiras la plej altan prezon sur la cepomerkato en Eŭropo, kaj por la kruda, kaj por la prilaborita, sekigita varo. En la sekigejo de Makó ĉiujare estas produktataj 1500 — 200 tunoj da sekcepaĵo, kiu egalas la dekoblon da kruda cepo.

En alia sekigejo de la entreprenon, en Szeged, krom cepon, oni prilaboras ankaŭ tomato-kapsikon, pastinakon, poreon, spinaco- kaj petroselofoliojn. Ties 90-95 procentoj

estas eksportataj okcidenten, la reston utiligas grandparte uzinoj pri viandaĵoj, konservaĵoj, kaj diversaj restoracioj. Venonte la entreprenon prezentos pli da sekigitaj cepoj kaj legomoj al la enlandaj dommastroj, tiucele uzante delikate kreitan pakafon.

INTER LA TRI PLEJ BONAJ

Por provizi la tri departementojn de la suda Ebenaĵo, oni instalas antaŭ kvin jaroj en Szatymaz uzinon por freŝigaj trinkaĵoj. Utiligante ekskluzive naturajn materialojn oni produktas ĉiujare 8 milionojn da litroj en boteloj. Depost la fondiĝo tiu uzino troveblas inter la tri plej bonaj en la kvalito-konkurso de „Canada Dry”, antaŭ pli ol tridek uzinoj de Eŭropo kaj Afriko.

Du produktaĵoj: la *Originala Orangsuko* kaj la „Etüd” frambo akiris la distingitan markon de la *Forumo de Eminentaj Varoj*.

Estas jam planataj aliaj metodoj por prilabori legomaĵojn kaj fruktojn: profundfridiga, fruktopulpiga kaj varme konservanta uzinoj estos instalitaj.

Ĉi-jare la entreprenon enspezis en pomalgranda komerco pli ol 800 milionojn da forintoj. En la departemento Csongrád ĝi funkciigas en la urbo 55 vendejojn.

ZÖLDÉRT de Csongrád-departemento ofertas en kvin fakvendejoj (agrikulturaj kaj specialaj pri semoj) aparatojn kaj ilojn por la etvolume-na kaj ĝardena kultivado. Estas tre grave, ke en la departemento Csongrád la produkto de legomoj kaj fruktoj estu daŭre la kvin- aŭ sesoblo de la loka bezono, ĉar tiam ZÖLDÉRT restos ne nur la provizejo de la departemento, sed — krom sia sesmilion-dolara eksporto — ĝi servos bonvene ankaŭ la provizadon de la tuta lando.

(Trad. Ervin Fenyvesi)

AGORA




ZÖLDÉRT SZEGED

KORAN BONVENON EN DEPARTEMENTO K O M Á R O M


Agrablaj plezuroj atendas la vizitantojn en la pitoreskaj
urboj ESZTERGOM, TATA kaj KOMÁROM.

La kuracakvan termobanejon de Komárom indas ĝui dum la tuta jaro.

Apud la termobanejo situas la dustela nova HOTEL THERMÁL
de KOMTURIST — taŭga gastejo por ripozantoj.



Estu nia gasto en Tata, Komárom, Esztergom.



Informojn volonte donas al Vi:
Centro KOMTURIST
H-2890, TATA, II., Ady E. u. 24.
Telefono: 34/83-211 Telekso: 27-459

komturist
H-2890 TATA II., ADY E. U. 24.
Telefono: 34/83-211 • Telekso: 27-459

